

B O N A E S P E R O

Gazeto de la Sudafrika Esperanto-Asocio

Oktobro 1982

ISSN 0006-7024

POR DISKONIGI NIAN AFERON

1987 rapide alproksimiĝas, kiam Esperanto fariĝos centjara. Ni nun faru al ni la demandon ĉu entute la homaro fakte scias pri la ekzisto de la lingvo. Ĉiuj ja scias, ke la respondo estos nea.

Kion fari por ke la kvar milionoj da homoj, parolantaj pli ol tri mil lingvojn, sciu, ke ekzistas unu lingvo kiu estas internacia? Unu maniero en kiu ni ĉiuj senescepte povas kontribui ion por diskonigi la fakton, ke Esperanto ekzistas estas uzi ĝin publike kaj montradi ion koncerne ĝin en nia ĉiutaga vivo. Unu rolo nia devas esti legi librojn, presaĵojn de de iaj ajn specoj en aŭtobusoj, sur ŝipoj kaj aviadiloj, en hoteloj, pensionoj, kafejoj, ie ajn kie oni venas en kontakto kun la ĝenerala publiko. Se iu montros ian intereson pri via legaĵo, eĉ se li ne la unua rompos la silenton, vi kaptu la okazon kaj faru ĝuste tion, klarigante kio estas Esperanto kaj donante iujn informojn pri la mondampleksa movado por instigi lian intereson kaj vekii lian apetiton. Ĉiu leganto tia devas havi ĉe si unu-du nacilingvajn flugfoliojn el kiuj transdoni ekzempleron al interesito, por ke li pli informiĝu el pluraj anguloj pri diversaj facetoj de nia afero. Eble ne ĉio ĝis nun skribita estos realaĵo ĝis 1987 sed sur tiu vojo ni devas marŝi, almenaŭ ĝis la centjara datreveno de la Internacia Lingvo. La tuta homaro sciu, kiom vivoplene ĝi ekzistas.

* * * *

LA REGO DE HISPANIO, Juan Carlos I, transprenis la prezidantecon de la Honora Komitato de la Internacia Sporta Seminario, kiu okazis en Madrid de 8-11.7.1982 kunlige kun la Mondaj Futbalaj Ĉampionludoj, kaj kies sola laborlingvo estis Esperanto.

* * * *

SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

P.O. BOX 1227, Cape Town.

PREZIDENTO: S-ro E. de Kock.
VIC-PREZIDENTO: S-ro A. von Blottnitz.
SEKRETARIO: S-ro Q. Sher.
KASISTO: S-ro C.S. Beckford.

ENHAVOJ

Por Diskonigi Nian Aferon	1
Estraro kaj Enhavo	2
Por la Vereco en la Varbado	3
Baraktoj per la Angla kaj Aliaj	4
Du Gravaj Datrevenoj	5
Tra la Mondo	6
Dek Du Piedetoj	7
Trilingva	8
Artikolo	9
Sugestita Nova Alfabeto	10
Reklamo el la Jaro 1907	11
Venteraĵoj	12
Prokrastita Instigilo	13
Nenio Gravas	14
Deziras Korespondi	15
El Nia Gramatiko	16

LA KOMITATANOJ: S-ino A. Fouche; s-roj H.J. Appel,
d-ro J. V.D. Strydom, F.M. Woolf.

Redaktoro: F.M. Woolf, Box 18, SEA POINT, 8060; Tel:
442657, helpe de C.S. Beckford, Tel: 22.6326, hejme:
77.0588.

Esperanta vortaro estas prenita je 60% el la latinidaj lingvoj, 30% el la germanaj kaj 10% el la slavaj. Ĉu iu iam kalkulis tiujn vortojn? Eĉ sen kalkuli estas evidente, ke la procentaĵo de la latinidaj estas tro malalta kaj tiu de la germana tro alta. Ju pli la vortprovizo de Esperanto kreskis, des pli kreskis la nombro de latinidaj vortoj, ĉar temas pri tiel nomataj internaciaj vortoj, kiuj preskaŭ senescepte estas prenitaj el la latinidaj aŭ la latina lingvoj. La cifero de 10% el la slavaj lingvoj estas simple fantazio, ĉar ne estas 10% sed dek vortoj, ekz., nepre, svati, klopodi, kolbaso, kaĉo, sputniko, kaj povas ekzisti ankoraŭ unuopaj.

De kie tiu stranga proporcio de 60:30:10 povas deveni? Iu persono asertis, ke 60% de la vortoj estas tuj kompreneblaj por persono kies gepatra lingvo estas latinida, ekz., la franca, hispana, itala,, ke 30% estas kompreneblaj por germano, anglo, svedo, kaj ke 10% estas kompreneblaj por slavo, ruso, ĉeĥo, polo.

Kiam Zamenhof publikigis la Unuan Libron, li listigis kelkajn el la ĉefaj reguloj de sia gramatiko en 16 reguloj. En la tekstoj li aplikis multe pli da reguloj kaj tiujn la verkistoj de lernolibroj poste eltiris el la tekstoj kaj utiligis por sia instruado. Malgraŭ tio la propagandistoj de Esp-o ne laciĝas aserti, ke la gramatiko konsistas el nur 16 reguloj; kiel ajn oni difinas la vorton "regulo", oni ĉiam transiras la ciferon 16. Ĉiu Esperantisto, kiu trumpetas en la mondon, ke la Esperanta gramatiko konsistas el 16 reguloj, devas konsciĝi, ke li mensogas.

Pri kiom da personoj parolas Esperanton, unu miliono estas la supera limo. Oni ne povas pruvi tion, sed la eldonistoj de Esperantaj libroj ne devus limigi sian nombron por eldono al mil aŭ du mil, kaj ni posedus gazetojn, kiuj aperus pli ofte kaj pli dikaj ol nun. Estus bele, se en 30 universitatoj oni instruus Esperanton, sed nenie troviĝas la nomoj de tiuj universitatoj.

En la jura revuo Nuntius, Novembro 1973, aperis de nia samideano d-ro Nico van der Merwe amuza rakonto pri liaj lingvaj baraktoj unu nigran tagon en Japanujo.

Tio vere komenciĝis ĉar li ne elektis aŭ ial ne povis fari kontakton kun Esperantistoj. Anstataŭe li sin lanĉis en fremdlingvan medion nur helpe de la angla, por serĉi moderprezan Suntori-viskion. Kion li ne antaŭvidis sufiĉe, tio estis la mirinda nivelo de angla nescipovo ĉe la homoj en tiu lando de la leviĝanta suno. Liaj horoj de ne- kaj miskompreno, vojaĝproblemoj kaj ĉia perditeco ne malpli mense ol fizike - estis teruraj.

Same okazis al mi kaj la familio antaŭ dek du jaroj en la tiama Lourenco Marques, precipe ĉar ni ferie loĝis en ordinara anstataŭ turista kvartalo de la urbo. Tie preskaŭ neniu scipovis la anglan. Mi provis ĉion, fine balbutante eĉ latinon, la fonton de la portugala. Post tio mi imitis la blekadon de bovino kaj klukis, kun flugilaj brakmovoĵoj, en kafejo, sopirante lakton kaj ovojn. Ĉio vana! Sajne eĉ la bestoj de la portugaloj sonas kaj kondutas malsame ol la niaj!

Krome, en la centraj partoj de Lourenco Marques eble nur unu el ĉiuj dek personoj kapablis uzeti la anglan je nivelo de praktika utileco, kion mi testis persone. Tie mi renkontis viron de alta kulturo, kiun oni speciale alkondukis kaj tre varme rekomendis al mi. Sed kio okazis? Nu, ni interridetis kaj faris reciprokajn kapgestojn, kio finis nian tutan konversacion.

La plej utila lingvo, efektive, estis por ni la Xhosaa (indigena al Sudafriko), ĉar per ĝi ni povis komuniki kun la nigruloj, el kiuj multaj lernis kompreni ĝin dum sia laboro en niaj minoj. Siavice ili povis interpreti por mi parolanta kun la portugaloj.

Ne, ekster landoj kie oni igis ĝin oficiala - ĉefe post konkeroj aŭ koloniado - kaj en malmultaj aliaj medioj, la angla ne prezentas la respondon al la monda lingvoproblemo. Iu-loke ĝi estas tiel nekonata kiel la preskaŭ same disvastigita hispana en Sudafriko. Kaj ĉi tie persono kiu scipovas nur la noblan idiomon de Cervantes verŝajne mortus pro malsato. Tion ne malhelpus la fakto, ke la hispana disfloris tiel mirinde en multaj landoj kaj post 50 jaroj havos - laŭ la nunaj demografiaj tendencoj en latin-Ameriko - eĉ pli da parolantoj ol la angla. (daŭrigata sur paĝo 13)

DU GRAVAJ DATREVENOJ

1987 estos la centjara datreveno de Esperanto, kiel ankaŭ la 25-jara de Sudafrika Esperanto-Asocio. Por festi tiun ĉi ĝia komitato decidis okazigi kelktagan, tutlandan kongreson en Johannesburgo en Majo aŭ en Junio de 1987. Membroj de SEA estas petataj ensendi tiurilatajn sugestojn, proponojn, ideojn, ktp., al s-ro A. von Blottnitz, Marcolaan 8, FLORIDA GLEN, 1710, kiu estas la kunordiganto.

La okazaĵo estos tre grava evento por la movado, ne nur sur monda skalo ĝenerale, sed ankaŭ por ni en Sudafriko, kie ĝi espereble havos por ni grandan efikon. Ĉiu faru laŭ sia eblo disponi al ni siajn elpensadojn por ke ni povu forte impresi la publikon kaj diskonigi nian aferon. Ĝi estos ŝanco kiun ni absolute ne devus preterlasi, okazu kio ajn.

* * * *

SIMBOLO POR LA JUBILEO

Ekzistas plurspecaj simboloj kaj tuta scienco pri ili kaj pri la rilatoj inter ili kaj la homa menso.

Esperantistoj posedas simbolojn kaj iuj eĉ opinias, ke ni uzas tro da simboloj en tro da buton-truoj. Tamen, ni nun bezonas unu plian.

Kiel vi jam legis, komenciĝas la agado celanta festi la jubileon de la internacia lingvo en la jaro 1987. La simbolo kiun ni bezonas estas ĝuste "taŭga simbolo por la festado" kiel simple diras la agadprogramo aprobita de la komitato de UEA.

Ĝi emfazu nian historion centjaran, la pluvivon kaj daŭran plilarĝiĝon de nia komunumo kaj samtempe niajn celojn kaj nian pretecon alfronti la perspektivojn de la dua jarcento.

Ĉu tio estas montrebla per simbolo, kiu, laŭ la menciita programo, devas krome esti "presebla per unu koloro kaj facile komprenebla al la ekstera publiko"? La estraro de UEA opinias ke jes, kaj pro tio ĝi lanĉas konkurson por tiu simbolo.

Esperantisto partoprenanta la konkurson rajtas peti la helpon de neesperantista grafikisto por pretigo de la simbolo aŭ povas instigi tiun rekte partopreni.

Limdato por ricevo en la Centra Oficejo de la konkursaĵoj estas la 31a de Oktobro 1982. Do, ek al ... !

CINIO: Dum Decembro 1981 en Peking pli ol 150 personoj, eminentaj reprezentantoj de la intelekta, universitata, politika medioj, kunvenis okaze de la inaŭguro de la asocio "Amikoj de Esperanto".

HINDIO: Dum Februaro ĉi-jare okazis en Vijayawada la unua Tuthinda Esperanto-Kongreso, kiun partoprenis kelkdeko da personoj el la tuta vasta lando. Post zorga analizo de la Movado en la Hindia Unio, la kongreso decidis fondi novan organizaĵon.

HISPANIO: "Petete", nova revuo pri edukado kaj instruado en kastilia lingvo por la infanoj, enhavas vortaron kun 10 lingvoj, inkluzive de Esperanto. - En la malliberejo de Las Palmas (Kanariaj Insuloj), 5 malliberuloj kaj unu gardisto studas Esperanton.

HUNGARIO: Post ekspozicio en Haarlem, lige kun sia 85a datreveno, la nederlanda artisto Hugo Landheer donacis 50 el siaj pentraĵoj al la Esperanto-Muzeo en Szeged.

ITALIO: La Movado Franciskana Ekfloro, junaj amikoj de S. Francisko, starigis en Cuneo (nord-okcidenta Italujo) kurson de Esperanto komparata kun aliaj lingvoj, antikvaj kaj modernaj. La kurso okazas lunde kaj ĵaŭde.

JUGOSLAVIO: En Banja Luka nun ekzistas 16 agadgrupoj por Esperanto. Du el tiuj kluboj estas en fabrikoj, tri en la loka universitato, sep en mezlernejoj, ktp. La urbo ĉi-jare subtenas ankaŭ finance la Esperanto-agadon.

GERMANIO (F.R.G.): En sia klopodo helpi la Internacian Lingvon al plua agnosko, la Germana Esperanto-Instituto ofertas ekde 1982 kursestrajn seminariojn kun la celo ekzercigi ekzamenitajn Esperanto-Kursestrojn.

FRANCUJO: En 1981 la delegitoj kaj fakdelegitoj de la lando ricevis 381 informpetojn, el kiuj 108 rilatis turismon, 78 profesian laboron, 40 filozofiajn demandojn, 45 filatelon, 8 radion, 38 estis korespondpetoj kaj 64 traktis aliajn temojn. 32 francaj delegitoj akceptis 95 eksterlandajn gastojn; 37 delegitoj gvidis Esp. kursojn kaj 11 aranĝis ekspoziciojn.

LINGVAJ MALFACILAĴOJ: Pro tiuj ĉi, i.a., en Hungarujo, la American Field Service, asocio zorganta pri loĝeblecoj inter gast-familioj, petis kunlaboron de belgaj Esperanto-Grupoj.

Antaŭ iom pli ol dek jaroj aperis libreto de la konata aŭtorino f-ino Marjorie Boulton, nomita Dek du Piedetoj kies ĉefaj roluloj estas 3 amindaj, inteligentaj katoj. Ĝin kelklinie recenzis iu anonima sinjoro Vo-Vo per tiel severe kritikaj kaj akraj vortoj, tamen ŝajne al mi tute nemerititaj, ke tuj plenigis min sento elverŝi sur lin mian splenon per celtrafa polemiko, kiu reduktos lin al absurdeco. Mi do tuj skribis al f-ino Boulton, esprimante mian bedaŭron kaj kunsenton, inkluzivante mian polemikaĵon, eĉ se li neniam vidus ĝin. Mi faris tion nur por iom malŝarĝi mian senbridan pasion! Jen ĝi, kiel ankaŭ la leteron responde ricevitan:

Tre povas esti, ke Vo-Vo troviĝis en stato de KATalepsio, eble kaŭzita de kruela KATaro, kaj KATenita de KATarakto, kiam li entreprenis KATEkizi el alproprigita KATedro. Li evidente bezonas iom da KATaplasmo, se ne paroli pri KATizo. Venante de memkonfesita KATamanto, lia KATveado estas pli KATAstrofo ol KATAstrofo!

Noto: Kataro: muka fluo pro inflamo de muka membrano. Katamanto (angle: catamount): Rabobesto el familio de katoj kun nigremakulita felo (P.V.).

Jen la responda letero de f-no Boulton: Somerville
Cottage,
Oxford, OX2 6HD
Estimata sinjoro Woolf, Oxford, OX2 6HD
Mi nur hodiaŭ ricevis vian leteron, kiu 30.X11.71
longe rondiris post mi; mi forlasis Ambleside
en 1970.

Mi dankas vin pro viaj afablaj pensoj kaj sprita rebato pri mia malgrava verketo, kaj mi kredas, ke la plej bona premio estas ekzemplero de la verketo, por ke vi vere povu juĝi mem!

Mi ne taksas mian neserioze-intencitan verkon tre alte, sed tiu recenzisto estis tiel videble nekompetenta, ke la respondoj de aliaj vigle rebatis liajn insultojn. Iu kutime bone informita poste diris al mi, ke probable lia malamo kontraŭ mi - ĉar mi neniam iel ajn misfaris kontraŭ li - estas, ĉar mi gajnis pli altan salajron ol li, kaj ke li estas tiel malice envioplana, ke li malamas ĉiujn tiajn! Mi ne scias, ĉu estas vere, sed
(al paĝo 10)

Bells give an exciting chance to those who wish to serve their church and community by ringing them. The traditional method of "ringing the changes" is not difficult to learn and provides a lifetime interest. Bell ringing is more alive than ever, and is practised in schools and universities in the United States, Australia and Britain. This ancient art has taken root in South Africa. Until South Africa's first octave was installed at St. George's Church in Parktown, Johannesburg last December - the first peal in the Transvaal - there had been only five rings of bells in South Africa, the Cape and Natal.

In 1977 Shirley and Andrew Bolton of Parkview started spadework for the establishment of the Transvaal Society of Church Bell-Ringers. Mrs. Bolton started ringing in 1958 in her village church in England. Bells were one of the things that brought the Boltons together.

Sonoriloj provizas ekscitan ŝancon al tiuj kiuj deziras servi sian preĝejon kaj komunumon ilin sonorigante. La tradicia angla metodo "sonori la ŝanĝojn" estas facile lernebla kaj donas vivodaŭran intereson. Sonoril-sonorado estas pli ol iam vivoplena, kaj oni ekzercas sin pri ĝi en lernejoj kaj universitatoj en Usono, Aŭstralio kaj Britujo. Tiu ĉi antikva arto enradikiĝis en Sudafriko. Ĝis la unua sudafrika oktavo instaliĝis en Sankta Georgo Preĝejo en Parktown, Johannesburgo, lastan Decembron - la unua sonorilaro en Transvalo - ekzistis nur kvin de tiu ĉi en la tuta lando - en Kablando kaj en Natalo. En 1977 Shirley kaj Andrew Bolton de Parkview komencis la preparlaborojn por la establiĝo de la Transvala Societo de Preĝeja Sonoril-Sonorilistoj. Sinjorino Bolton, kiel studentino, komencis sonorigi en 1958 en sia vilaĝpreĝejo en Anglujo. Sonoriloj estis unu el la aferoj, kiuj altiris la Bolton-ojn unu al la alia.

Die lui van kerkklokke bied 'n opwindende geleentheid vir diegene wat hulle gemeentes wil dien. Die kuns om klokke met variasies te bespeel is in die Engelssprekende wêreld 'n groot tradisie. Dit is nie moeilik om aan te leer nie en bevredigend genoeg om 'n leeftyd te vul.

Vandag leef dit meer as ooit. Dit word beoefen in universiteite en skole in die Verenigde State, Australië en Brittanje. En nou het hierdie antieke kuns ook begin posvat in Suid-Afrika waar by kerke in die Kaap en Natal vyfklokspeler beoefen word. Die eerste oktaaf in die land is in Desember by die St. George-kerk in Parktown, Johannesburg, gehang.

Shirley en Andrew Bolton van Parkview het in 1977 met aanvoorkerk begin vir die stigting van die Transvaalse Vereniging van Klokkespelers. Shirley, toe sy nog 'n skooldogter was, het in 1958 al kerkklokke begin lui in haar dorpskerkie in Engeland. Dit is een van die dinge wat haar en haar man bymekaar gebring het.

* * * *

ETA KAŬZO - GRANDA EFIKO!

La sciencistoj certe pravas
Dirante, ke, samkiel homoj,
La floroj, fruktoj kaj legomoj
Malsamajn seksojn havas.

.

De bela arbo, postsomere,
Defalis piro kaj surtere
Renkontis sian amatinon,
Ruĝvangan, la pir-inon ...

Li pri soleco ŝin konsolis
Kaj varmiĝinte, ekpetolis,
Kaj amindumis la gepiroj
Samkiel la...geviroj!

En densa ombro de l' herbaro
Ge-amis sin la pira paro ...
Si naskis idon, kun doloroj,
Laŭdeve post naŭ horoj;

Kaj ĉiuj piroj kun aklamo
Bruegis je ĉi tiu vido,
Ĉar estis ido de l' pir-amo
Ververa ... Piramido!

.

- R. Schwartz.

trovas tion tre kredebla.

Sed mi dankas vin, ke vi volis forekzili lin en katamarano!

Sincere bondeziras,

Marjorie Boulton.

La verketo rangas inter miaj plej ŝatataj libroj.

F.M.W.

* * * *

Permesu al mi citi la unuajn frazojn en la verketo. Ili iomete montras la lertecon kaj vortmanipuladon de la aŭtorino:

Min havas kato. Tiu ĉi ne estas gramatika eraro. Mia kato estas aŭtokato kaj aristokato. Tiuj ĉi ne estas eraroj de ortografio. Ne estas mirinde, ke inter miaj poemoj kelkfoje troviĝas katastrofo; ke, sen fakaj studoj pri klasifikado, mi havas profundajn sciojn pri katalogado; aŭ ke, nescia pri fiziko, mi kapablas krei, eble jam iasence kreis, katodon. Tiuj ĉi ne estas eraroj de semantiko. Ktp.

* * * *

Jen transskribo de letero de ni ricevita antaŭ ĉirkaŭ 10 jaroj. Ĝi estas absolute memklariga:

Estimata redakcio, per txi tio ni sendas al vi la definitivan solvon de la problemo pri sensupersigna alfabeto de Esperanto, solvon kiu neniel xandjas la parolatan lingvon kaj sekvas la postuloin de la principo "unu sono, unu signo" kaj efektivigas la egalecon inter txiui Esperantistoj kaj tziui nacioi kiui volas uzi la internacian lingvon. Ni esperas, ke vi ne neglektos la problemon kaj kaxos djin de viai legantoj, txar per tio

VI ENDANDJERIGOS LA TRIUMFON DE ESPERANTO, txar estas klare, ke la potencaj decidontoj ne volos mem studi kaj "korekti" la elektotan lingvon. Ili nur elektos la plej allogan, kiu estos tui uzebla per txiu tajpilo kaj txiu kompostilo. Kai tian ili certe trovos inter niaj konkurantoj - kiui certe ne mankos. Kun sincera saluto,

Bjorn Collinder

Vilho Setälä

Kiam L.L. Zamenhof estis en Britujo por ĉeesti la trian kongreson en Cambridge, li estis intervjuita de Isidoro Harris cele al aperigo en The Jewish Chronicle. La intervjuo aperis en la numero de 6a Septembro kaj en la malsupra dekstra angulo de paĝo 17 aperas E-lingva reklamo, kiu tekstas jene, supozeble preparita de Harris:

"NUTRA ĴO SEN EGALO" Dro. A. Wilson
L A K A K A O (FRSE)., k.t.p.

PURA KONCENTRIGITA

300
 Oraj Medaloj de FRY
 k.t.p.

"Neniam mi gustumis kakaon tian, kian mi tiel multe ŝatas".

Sir Charles Cameron, C.B., M.D., Eks-
 Prezidanto de la Reĝa Kolegio de Air-
 urgiistoj, Irlando.

Pri la reklamo necesas pluraj komentoj. La A de Airur-
 giistoj kompreneble devas esti Ĥ. La litero ĵ estas
 skribita sen superpunkto en E-o, sed la kompostisto ne
 sciis, ke oni devas ellasi la punkton. La mallongigoj
 F.R.S.E., C.B. kaj M.D., samkiel la vorto Sir ne estis
 tradukitaj Esperanten. Ĝi respondas al la Esperanta
 vorto Kavaliro, kutime uzata en la E-a versio de la no-
 moj de la britaj portantoj de tiu honortitolo.
 La nuna kutima formo de la mallongigo estas ktp. (kvan-
 kam oni ankaŭ trovas ktp kaj k.t.p.). Ne devus troviĝi
streketo en eksprezidanto. En la lasta linio la vorto
de devus anstataŭi la komon. En la angla en tiaj kun-
 tekstoj ofte troviĝas "Dean, Faculty of Arts", sed en
 E-o oni preferas plie klarigi la rilatojn.

(Redakcia Noto: La diversstila tiparo uzita en la or-
 iginala reklamo estis multe pli granda (ĝis kvinoble
 pli) ol ĉi-supre montrita, sed en ĉiuj aliaj aspektoj
 ni laŭeble sekvis tiujn de 1907, inkluzive de la (por
 ni iom stranga) aranĝo kaj ordigo de la presliteroj).

Sur bieno apud Lindley (Liberŝtato) loĝas iu s-ro Wynand de Wet, kiu bredas nekutimaĵon, nome, ege malgrandajn ĉevalojn. Sur la bieno troviĝas ĉirkaŭ 60 da tiaj etuloj. Plenkreska virĉevalo tie estas malpli granda ol virŝafo. La plej malgranda sur la bieno estas 61 centimetrojn alta ĉe la ŝultroj kaj tamen estas plenkreska.

Anekdotoj. Oni proponis al Trotsky amnestion, se li publike diros la jenon: "Stalin estas gvidanto de la tutmonda revolucio. Mi pardonpetas". Trotsky ekridetis sed konsentis. Stariĝinte sur la podio li deklaris: "Stalin estas gvidanto de la tutmonda revolucio??? Mi pardonpetas.

Ie en Anglujo ino estis arestita pro tio, ke oni prenis ŝin por putino. Ŝi neis la akuzon, deklarante, ke ŝia vidpovo estas tiel malforta, ke ŝi nur de tre apude povas vidi iun. Do, laŭ ŝi, estas neeble al ŝi tiumaniere sin okupi.

"Kia estas via sinteno al Soveta regno"?

"Samkiel al mia propra edzino ...".

"Kion tio signifas"??

"Nu, mi iom amas, iom timas, kaj volonte eĉ perfidus..."

Okazis en Boksburg, Transvalo. Homo estis surgluonta impostmarkon je valoro de 100 randoj sur gravan dokumenton. Dum li ĝin lekis, kunulo rakontis tre amuzan ŝercon. La surgluanto tiel nesinrege ridadis, ke li ensuĉis kaj englutis la glumarkon, kaj do urĝe devis iri al la impostejo por aĉeti novan, kaj estis ĝuste tie, kie la malĝojiga historieto riveliĝis.

Bienlaboristo en Bonnievale, Kablando, iu Kallie Fortuin, sekse perfortis virinon sed baldaŭ poste estis kaptita. Filo de la viktimo ekprenis tranĉilon kaj tenante ŝargitan pafilon kontraŭ ties kapo, devigis lin forigi liajn pekigajn glandojn - kion li lerte kaj sperte faris, ĉar estis unu el liaj devoj katri porkojn.

Naŭjara hinda knabo de ie apud Durban plenigis botelon per "seka glacio" - solidiĝinta karbo-dioksido, kaj kune kun amikoj atendis kelkdistance por vidi kio okazos. Io vere okazis. La solida karbo-dioksido vaporigis kaj pro la estiĝinta premo la botelo bombsimile eksplodis. Vitropeco trafis la knabon, tratranĉante arterion kaj li mortis survoje al la hospitalo. - El diversaj fontoj, E.S. Venter.

Jam longan tempon mankas al la Redakcio novaĵoj /informoj kaj faroj/faraĉoj de/pri niaj membroj. Krom tiuj ni denove petas de vi ĉiuj kontribuaĵojn, de iaj ajn specoj kaj kvalitoj, ili estu pri kio ajn en kia ajn formo - prozo, poezio, humoraĵoj, eseoj, ktp., por ke niaj membroj pli intime kaj varme konatiĝi kaj sciigi unu pri la alia, tamen ne tro ... !

Ni volonte informiĝu pri iaj sukcesoj kaj prosperoj, vojaĝado, ktp., kiujn spertis iu aŭ tiu, tiel ke ni povu dividi la ĝojon kaj plezuron kun ĉiuj. Ĉiukaze, ĉu ni ne estas membroj de unu granda rondo familia?

Ni jam antaŭĝojas malfermi nian poŝtfakon kaj vidi ĝin plenŝtopita per kontribuaĵoj. Do, ne prokrastu, komencu jam nun! Ek al la plezurdona tasko ... !

* * * *

(Daŭrigata de paĝo 4):

En Lourenco Marques mi kompreneble renkontiĝis kaj agrable parolis ankaŭ kun la tieaj gesamideanoj. Sendube d-ro van der Merwe estus povinta, en pli feliĉaj cirkonstancoj, fari la samon al niaj japanaj kunstrebanantoj.

* * * *

- E. de Kock.

En 1970 alveninte Florencon de Venecio kaj vojaĝante al Sorrento mi ne disponis troan tempon. Mi postlasis mian valizojn ĉe la hotelo kaj komencis esplori la urbon. Alveninte al la katedralo kaj trovinte ĝin neinteresa mi pasumis al la apuda belfrido Giotto. De la supro mi admiris la belan pejzaĝon, fotis kaj rimarkis la aŭtobuson ekveturi revene al la hotelo, al kiu mi do devis piediri! Sed al kiu hotelo? Mi tiel rapide forlasis ĝin, ke mi ne notis ĝian nomon. Kion fari? Mi subite memoris, ke ĝi situis proksime de la stacidomo. Mi do demandis preterpasanton: "Where is the railway station?" La Italo kapskuis, levis la manojn, murmuris ion nekompreneblan, la samo pri kelkaj aliaj homoj. Neniu parolis la anglan. Fine ĉe apoteko mi provis mian malfortan germanan. Mi trafis! Oni eksteren kondukis min kaj klarigis kiel trovi la stacidomon, de kie mi facile trovis mian hotelon. La angla tute ne estas la "internacia lingvo"; kiel tiel ofte diras la anglaparolantoj.

- C.S. Beckford.

Tio, kion mi nun rakontas, vere okazis. Por ne embarasi la ĉefrolulon, malgraŭ ke li ne estas Esperantisto, mi ŝanĝis la nomojn.

Ĵaŭdon, la 11-an de Februaro, je duono post la deka, s-ro E. Ikso kuŝis en la lito kaj legis libron. Subite sonoris la telefono:

"Halo"!

"Halo, mi ĝojas aŭdi vian voĉon!"

"Kial?"

"Mi legis en la ĵurnalo, ke s-ro J.J. Ikso de Ispalonstrato 215 mortis Mardon rezulte de trafikakcidento".

"Ja estas mia adreso. Jam kelkajn tagojn mi nenion aŭdis de mia patro. Liaj korespondaĵoj venas al mi. Sed liaj antaŭliteroj estas H.A.".

S-ro Ikso telefonis al la kadaverejo. Tie oni informis lin, ke la J.J. Ikso pri kiu temis en la raporto estas dujara infano.

Sabaton, kiam li ankoraŭ nenion aŭdis de sia patro, s-ro E. Ikso ree telefonis al la kadaverejo. Tiam li konstatis, ke ja estis lia patro. Kiam li la unuan fojon telefonis, oni rigardis en libron en kiu, kie devas stari aĝo, staris demandsigno. La persono, kiu respondis al la telefono, legis la demandsignon kiel la ciferon 2!

Nun klariĝis, ke s-ro H.A. Ikso troviĝis en akcidento Mardon matene. Li jam estis mortinta je alveno ĉe la hospitalo. La intendantino urĝe petis flegistinon telefoni al numero, kiun oni trovis sur la kadavro - fakte, la telefonnumero de s-ro E. Ikso. La flegistino klopodis unufoje, sed neniu respondis. Ŝi ne denove klopodis. La intendantino ne kontrolis, ĉu la flegistino sukcesis fari kontakton. La ĵurnalo aperigis la nomon de la mortinto, ne konstatinte ĉu aŭ ne la parencoj jam informiĝis.

Miaopinie la ĉi-supra rakonto estas simptomo de malsano inter ni ĉiuj nuntempe. Nia sinteno al nia laboro estas tro facilanima. Ni verŝajne rigardas nian laboron simple kiel rimedon por pergajni saiaĵron. Ni ne montras sufiĉan zorgon por certigi, ke ni faras niajn ĉiutagajn taskojn juste kaj ĝustamaniere.

- O. Sher.

Estas pli honte malfidi siajn amikojn, ol esti trompita de ili.

- La Rochefoucauld.

Estimataj sinjoroj,
Bonvolu presi mian nomon kaj adreson. Mi deziras kontakti kun samideano en via lando. Mi estas Franca lingvo-instruisto.

Mia nomo: Patrice de La Condamine, knabo. Adreso: Cahelais, Saint-Molf 44350 GUERANDE Francio. Miaj hobiaj estas; literaturo, filozofio, vojaĝado, muziko, fotografado. Mi estas 27-jara, kaj tremulte dankas vin.

Estimata,
Mi estas 14-jara knabino kaj tre volus trovi amik(in)on el via lando. Ĉu vi al mi helpos? Lenka Masařiková, 78811 Loučná n/D 77, OKRES ŠUMPERK, Ĉeĥoslovakujo.

F-ino Carmen Clara CAMERO, studentino pri plantkultivo; skoltismo en Venezuela, CARACAS 1040, Vereda 60, No 11, Coche.

Miklos Virag, studento (23) pri turismo, sporto, ekskursoj, muziko, lingvoj; SUBOTICA, Ivana Milankoviĉa 29B, Jugoslavio.

* * * *

La prezidanto de la loka grupo okaze de jubileo ricevis de la grupanoj sablan horloĝon. Fiere li montris ĝin al sia familio: Vera svisa sablo estas en ĝi!

Imagu, amiko, mia fileto ege similas min.
Ne malĝoju! Gravas, ke li estu sana.

Kuracisto esploras ŝin: "Kion vi sentas, se mi premas vin ĉi tie? Aŭ ĉi tie?"

"Ho, mia Dio, kara doktoro! Mia junaĝo venas en mian memoron..."

Mortis la brila, felon-havanta zibelino en la neĝplena arbaro. Ĝia animo kuris supren sur la falantaj neĝflokoj en la ĉielon, kaj haltis antaŭ Sankta Petro, kiu demandas: "Ĉu vi havas ian varman deziron?"

"Jes", respondas la zibelin-animo, "mi dezirus havi mantelon kudritan el la haŭto de iu riĉa sinjorino ... "

"Hej, amiko ĉimpanzo! La homoj originas de ni, kaj ili kredas, ke NI estas fieraj pro tio ... "

- Rigardu tiun fiaŭtiston, kiel li zigzagas ... Damnita stratorato! - Ne incitiĝu! Li kredas sin aŭtokrato!

Sajnas, ke eble ne ĉiu scias pri la principo de Necesoj kaj Sufiĉo, kiu aplikiĝas al la vortfarado en Esperanto. Laŭ la teksto, kiu aperis en la Oficiala Gazeto en Majo de la jaro 1913 (antaŭ pli ol 50 jaroj):

"La Akademio rekomendas al la Esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

(a) Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto;

(b) Principo de sufiĉo: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa".

En Plena Gramatiko oni koncize resumas tiujn du principojn jene:

"En la konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, afiksojn kaj finaĵojn, kiuj necesas, sed ne pli ol kiom sufiĉas por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan".

La aŭtoroj de PG atentigas, ke la ĝusta apliko de la principoj de neceso kaj sufiĉo necesigas scion pri la gramatika karaktero de la radikoj uzataj.

En la fruaj jaroj de la lingvo oni kutimis uzi tiajn vortojn kiel KREDEMECO, sed evidentiĝis poste, ke tiaj formoj estas nenecese pezaj, kaj nenion aldonas al la pli simplaj formoj kiel KREDEMO. Ankoraŭ pli poste, sed konforme al la uzado de Zamenhof mem, fariĝis pli uzataj la formoj SKRIBO, VESTO, PLANTO anstataŭ SKRIBAJO, VESTAJO, PLANTAJO.

Oni ĉiam memoru, ke la lingvon faras ties uzantoj, ne la gramatikistoj aŭ la teoriuloj, kaj ke - unualoke la literaturo registras la evoluon kaj la kreadon de novaj formoj, kiel ankaŭ la forvelkon de arkaikaj esprimmanieroj.

* * * *